# La Esperantisto.

**Zeitschrift für die Freunde der Esperantosprache.**

Herausgegeben unter der Mitwirkung des **Dr. Esperanto** (Dr. L. Samenhof) von **Chr. Schmidt**, Vorstand des Weltsprachevereins in Nürnberg.

**Erscheint monatlich einmal.**

Zu bestellen auf der Post und in der Buchhandlung von **Heerdegen-Barbeck** in Nürnberg.

Preis 1 Mark für das Vierteljahr (durch die Post 1.15 Mk.).

Anzeigen werden angenommen zu 20 Pfennig für die Petitzeile.

**Gazeto por la amikoj de la lingvo Esperanto.**

Sub la kunlaborado de **Dr. Esperanto** (Dr. L. Zamenhof) eldonata de **Chr. Schmidt**, prezidanto de la klubo mondlingva en Nürnberg.

**Eliras unu fojon en la monato.**

Oni povas aboni sur la poŝto kaj en la librejo de **Heerdegen-Barbeck** en Nürnberg.

Kosto 1 marko por ¼ de jaro (per la poŝto 1 marko 15 pf.).

Anoncoj estas akceptataj por 20 pfenigoj por la petitlinio.

**Nr. 6.** **Nürnberg,** 25. März 1890. **1. Jahrgang.**

## Pri nia Ligo.

Por respondo je nia peto en la No. 3 de la „Esperantisto“ (Decembro 1889) ni ricevis de diversaj flankoj projektojn por la Regularo de la kreota Ligo de Esperantistoj. Al ĉiuj sendintoj ni esprimas nian koran dankon. Sed, laŭ nia opinio, bedaŭrinde neniu el la senditaj projektoj povas esti uzata. Preskaŭ ĉiuj ili havas unu ĉefan eraron: ili estas tro abstraktaj. Tre ofte estas en ili renkontataj la vortoj: „oni“ devas fari, „oni“ devas elekti — sed ne estas dirita kiu kaj kiel. Ne havante ankoraŭ aŭtoritatan juĝantaron, kiu povus konsiliĝi pri la detaloj kaj plenigi ilin, ni devas havi Regularon tute definitan kaj klaran, por povi jam fari la komencon. La senditaj projektoj estas ankaŭ tiel malegalaj inter si, ke estus tre malfacile elekti, kiu estas pli bona, kaj se ni volus lasi la decidon de tiu ĉi demando al la multaj legantoj, la demando neniam estus finita. Tial por ne perdi tro multe da tempo, ni permesas nun al ni doni nian propran Regularon kaj ni petas por la unua tempo akcepti ĝin tiel, kiel ĝi estas. Se poste montriĝos, ke nia Regularo estas ne praktika, ĝi ja povos poste en ĉiu tempo esti ŝanĝita (laŭ la § 19); sed almenaŭ tiam ni jam scios, kiu povas juĝi pri la Regularo kaj alformigi ĝin, dum nun ni ne havas ankoraŭ definitan juĝantaron por elekti inter la projektoj.

Nia Regularo estis preta jam antaŭ kelkaj monatoj; sed antaŭ ol presi ĝin, ni volis aŭdi la opinion kaj la konsilojn de ĉiaj amikoj kaj tial ni petis, ke oni sendu al ni diversajn projektojn, por ke ni povu kompari ilin kun la nia kaj en okazo de bezono fari en nia Regularo kelkajn ŝanĝojn kaj plibonigojn. Nun, tralegինte la alsenditajn projektojn, ni vidas, ke ni nenion gravan ellasis en nia Regularo kaj ke ĝi nun povas jam ricevi vivon. Tial ni prezentas nun nian Regularon al niaj amikoj kaj ni esperas, ke ili ne malkontentos, se ni hodiaŭ sciigos publike, ke de la tago hodiaŭa la Ligo jam estas fondita. Ni petas la amikojn de nia afero komenci de hodiaŭ ilian laboradon, kaj Dio donos sian helpon al nia penado por la sankta afero.

Nia Regularo estas bone pripensita kaj fondita sur la praktika sperto, kiun nia du-jara publika laborado donis al ni. Nenio nun baras al ni la vojon por jam fari la komencon. Komenci disputadon pri la apartaj flankoj de la Regularo estas laŭ nia opinio superflue, ĉar, ni ripetas: 1) la disputado kaj analizado neniam finiĝus; 2) se kelkaj flankoj de la Regularo poste montriĝos ne praktikaj, la Ligo povos jam mem ilin ŝanĝi sur vojo klara kaj definita, sen disputoj kaj malordoj.

Kelkaj el la plej varmaj amikoj de nia afero estas absolute kontraŭ ĉia kreado de Ligo. Nun kiun obei? Se la aŭtoro havus la materialan eblon, li kun plezuro prenus la tutan aferon sur nian propran respondecon; sed bedaŭrinde li la eblon ne havas. Tial Ligo devas esti fondita; sed ni ĉiuj veraj amikoj povas ĉiam penadi per nia voĉo kaj agitado retenadi la Ligon de ĉia facilanima paŝo, kaj se nia opinio efektive estas vera kaj praktika, nia voĉo esperեble estos obeata. Se tamen nia voĉo restos sen rezultato kaj la voĉo de la plejmulto restos kontraŭ nia opinio, tio ĉi devos montri al ni, ke ni eraras, kaj pro la bono de la afero ni devos cedi al la plimulto. Malordon en la afero ni timi ne devos, ĉar malordo venas unu tiam, se batalas du egalfortaj partioj (kiel ekzemple en Volapük la Akademio kaj la Aŭtoro); sed en nia afero estos ĉiam nur unu aŭtoritato (la Akademio, kreita de la amikoj mem) kaj leĝdonanta ĉiam estos nur la voĉo de la plej multo. Se ni mem obeados al la plejmulto, tiam ankaŭ ĉiaj aliaj obeados al ĝi kaj en nia afero regados ĉiam eterna konsento.

La „ligo Internacia de Esperantistoj“ estas fondita! Ni esperas ke de la minuto, kiam niaj amikoj finis la legadon de nia nuna artikolo, ili tuj kun sankta energio komencos sian laboradon, t. e. ili penados la plej baldaŭ fondi lokajn klubojn ĉiu en sia urbo. La fondado de kluboj laŭ nia Regularo estas afero tre facila: ĉiu devas nur peni trovi inter siaj amikoj kaj konatoj kiel eble plej grandan nombron da personoj, kiuj promesos ĉiumonate doni kelkan monan oferon por nia afero. Ĝis ĉiu klubo elektos sian reprezentanton kaj kolektantojn, ĉiu amiko de nia afero devas esti mem la reprezentanto kaj kolektanto en la rondeto de siaj konatoj.

Amikoj! En la intereso de la homaro kaj en la nomo de nia sankta granda celo antaŭen al la laboro! Ni esperas ke jam en la venonta numero de nia gazeto ni povos kun ĝojo doni la sciiĝon pri multaj fonditaj lokaj kluboj. Ni laboru kaj esperu!

L. Z-f.

einige Personen, welche die Verpflichtung auf sich nehmen, am 1. jeden Monats die monatlichen Beiträge der Mitglieder (Geber) einzukassieren. Die betreffende Summe ist an den Repräsentanten des Klubs abzuliefern, welcher dann die gesamte eingegangene Summe mit dem Verzeichnis der Geber und dem Ausweis des Beitrages eines jeden an den Bundeskassier absendet. Dieser veröffentlicht allmonatlich im Bundesorgan die von den einzelnen Klubs empfangene Summe; das Verzeichnis der Geber verwahrt er bei sich auf, um es bei Anfertigung des alljährlichen Kassaberichts zu benützen (s. § 17).

§ 9. Jeder Klub arbeitet ganz selbständig, und wenn derselbe will, so kann er ausser den gemeinschaftlichen Bundessatzungen für sich eigene Statuten ausarbeiten. Die verschiedenen Klubs korrespondieren und beraten mit einander, reichen einander helfende Hand, stehen aber in keinerlei Abhängigheitsverhältnis zu einander oder zur Akademie.

§ 10. Diejenigen Angelegenheiten, welche den gesamten Bund berühren, wie z. B. die Vervollkommnung der Esperanto-Sprache oder die Verwendung der Bundesgelder, liegen in den Händen der Esperantisto-Akademie*), welche aus 10 Personen besteht und alljährlich von den Bundes-Klubs gewählt wird.

§ 11. Die Akademie wählt dann aus ihrer Mitte einen Präsidenten, Sekretär und Kassier.

§ 12. Die Wahl der Esperantisto-Akademie wird in nachstehend bezeichneter Weise durchgeführt: Derjenige, welcher Mitglied der Akademie zu werden wünscht, gibt den einzelnen Klubs spätestens bis zum September eines jeden Jahres Kenntnis von seinem Wunsche, dann aber auch von seinem Alter und seinem Stande. Gestützt auf die so empfangenen Anzeigen, auf die eigene Ueberlegung und Beratung mit anderen Klubs, fertigt jeder Klub ein Verzeichnis derjenigen Persönlichkeiten, welche er als Akademiemitglieder vorschlägt. Diese Verzeichnisse sendet jeder Klub spätestens bis zum 15. Dezember an den Bundes-Schriftführer. Die sämtlichen empfangenen Verzeichnisse gelangen im Bundesorgan zum Abdruck, und diejenigen 10 Kandidaten, welche die meisten Stimmen der Klubs (s. § 7) empfangen haben, werden als für das folgende Jahr in die Akademie gewählt veröffentlicht. Wenn das Resultat der Wahl zweifelhaft ist, da auf mehrere Personen die gleiche Anzahl von Stimmen fiel, so wird einstweilen die Akademie von den mit Majorität gewählten Personen gebildet; die übrigen Kandidaten müssen sich einer Neuwahl unterziehen.

§ 13. Wenn im Laufe des Jahres irgend ein Mitglied der Akademie ausscheidet, so sorgt die Akademie selbst für Ersatz.

§ 14. Alle Beschlüsse der Akademie kommen in folgender Weise zu stande. Wenn irgend eine Person (ganz gleich, ob dieselbe zur Akademie gehört oder nicht) der Akademie einen beliebigen Vorschlag unterbreiten will, so hat dieselbe den betreffenden Vorschlag den 10 Akademiemitgliedern zuzusenden (die Adressen derselben werden jedem bekannt sein).

Nach Empfang dieses Vorschlages benachrichtigt jedes Akademiemitglied den Schriftführer der Akademie, ob es den gemachten Vorschlag gut heisst oder nicht, und wenn mehr als die Hälfte der Akademiemitglieder ihre Stimme für die Annahme des gemachten Vorschlages abgeben, so wird derselbe im Bundesorgan abgedruckt und empfängt gesetzliche Kraft unter dem Namen „Bundesbeschluss“; der Bundespräsident hat dann für die Ausführung des gemachten Vorschlags Sorge zu tragen.

§ 15. Wenn die Akademie sich entscheidet, irgend eine künstliche Aenderung in der Esperanto-Sprache vorzunehmen, so erlangt diese Entscheidung erst nach dem Verlaufe von 3 Monaten, von der Veröffentlichung des Akademiebeschlusses an gerechnet, gesetzliche Kraft. (Dies geschieht, um die Sprache von leichtfertigen und unüberlegten Zerstückelungen zu bewahren und um dem ganzen Bund die Möglichkeit zu geben, die vorgeschlagenen Neuerungen wohl zu überlegen und zu besprechen.)

§ 16. Wenn ein Klub finden würde, dass der Sprache die von der Akademie in Vorschlag gebrachte Reform zum Schaden gereicht, oder dass der Nutzen der fraglichen Reform so unbedeutend ist, dass es sich nicht verlohnt, die Sprache einer Sektion zu unterziehen, so kann derselbe die vorgeschlagene Reform der Abstimmung sämtlicher Klubs unterstellen, und wenn es sich vor dem Ablauf der 3 Monate, von

*) Diese Akademie ist in der That das Zentral-Comité des Bundes; da aber in manchen Ländern die Zugehörigkeit zu irgend einem Comité oder Bunde mit Unannehmlichkeiten verknüpft ist, so trägt das Zentral-Comité den Namen »Akademie«, also aus demselben Grund, aus welchem die Bundesmitglieder »Geber« benannt werden.

de la oferintoj kaj kun la montro, kiom ĉiu el ili enportis, sendas ĉiumonate al la kasisto de la Ligo; la kasisto publikigas ĉiumonate en la gazeto de l' Ligo la komunan sumon ricevitan de ĉiu klubo, kaj la detalan nomaron li konservas ĉe si, por poste ĝin uzi ĉe la kunmetado de la detala ĉiujara kalkula raporto (vidu § 17).

§ 9. Ĉiu klubo laboras tute memstare kaj, se ĝi volas, ĝi povas ekster la regularo komuna de la Ligo ellabori por si ankaŭ sian propran regularon. La diversaj kluboj inter si korespondas, konsiliĝas, helpas unu al la alia sed trovas sin en nenia dependeco unu de la alia aŭ de la Akademio.

§ 10. La aferoj tuŝantaj la tutan Ligon, kiel ekzemple la perfektigado de la lingvo Esperanto aŭ la uzado de la kaso de l' Ligo, sin trovas en la manoj de la Akademio Esperantista*), kiu konsistas el 10 personoj, kiuj estas ĉiujare nove elektataj per voĉdonado de ĉiuj kluboj de la Ligo.

§ 11. La Akademio jam mem inter si elektas prezidanton, sekretarion kaj kasiston.

§ 12. La elektado de la Akademio Esperantista estas farata en la sekvanta maniero; ĉiu kiu deziras fariĝi membro de la Akademio, dissendas ne pli malfrue ol en la monato Septembro al ĉiuj kluboj sciigon pri sia deziro kaj ankaŭ pri sia aĝo kaj profesio. Apogante sin sur la tiel ricevitaj sciigoj kaj ankaŭ sur sia propra pripensado kaj konsiliĝado kun la aliaj kluboj, ĉiu klubo kunmetas nomaron de 10 personoj, kiujn ĝi proponas elekti en la Akademion. Tiun ĉi nomaron ĉiu klubo alsendas ne pli malfrue ol ĝis la 15a de Decembro al la sekretario de la Akademio. La nomaroj ricevitaj de ĉiuj kluboj estas presataj en la organo de l' Ligo, kaj tiuj 10 kandidatoj, kiuj ricevis de ĉiuj kluboj la plej multe da voĉoj (pri la voĉoj vidu § 7) estas publikigataj kiel elektitaj en la Akademion por la sekvanta jaro. Se la rezultato de la elektado estas ne klara pro tio, ke kelkaj personoj ricevis egalan nombron da voĉoj, tiam la akademio dume estas kreata el la personoj elektitaj sendispute, kaj la kandidatoj disputataj estas ripete balotataj.

§ 13. Se en la mezo de l' jaro iu el la membroj de la Akademio eliras, tiam alian membron sur lian lokon elektas jam la Akademio mem.

§ 14. Ĉiuj decidoj de la Akademio estas farataj en la sekvanta maniero: se ia persono (tute egale ĉu ĝi apartenas al la Akademio aŭ ĉu ĝi eĉ estas tute flanka) volas fari al la Akademio iam proponon, ĝi sendas tiun ĉi proponon al ĉiuj 10 membroj de la Akademio (iliaj adresoj estos al ĉiuj konataj). Ricevinte tian proponon, ĉiu Akademiano sciigas la sekretarion de la Akademio, ĉu li konsentas je la farita propono aŭ ne. Se montriĝas, ke pli ol duono de la Akademianoj donis la voĉon por la akcepto de la farita propono, tiam tiu ĉi propono estas presata en la organo de l' Ligo, ricevas leĝan forton sub la nomo de „decido de la Ligo“, kaj la prezidanto de la Ligo devas peni pri la plenumado de la farita propono.

§ 15. Se la Akademio decidis fari ian artan ŝanĝon en la lingvo Esperanto, tiu ĉi decido ricevas leĝan forton ne pli frue ol post paso de 3 monatoj post la publikigo de la decido de la Akademio (tio ĉi estas por gardi la lingvon de facilanima kaj ne pripensita rompado kaj por doni al la tuta Ligo eblon bone pripensi kaj priparoli la proponitajn novenkondukajon).

§ 16. Se unu el la kluboj trovos, ke la reformo proponita de la Akademio estos malutila al la lingvo, aŭ ke la utilo de tiu reformo estos tiel sensignifa, ke ĝi ne rekompencos la maloportunon, kiu estas ligita kun ĉia arbitra rompado de la lingvo, tiu klubo povas meti la proponitan reformon al la voĉdonado de ĉiuj kluboj, kaj se antaŭ la fino de 3 monatoj de la tago de publikigo de l' decido de la Akademio montriĝos, ke pli ol duono de la kluboj donis sian voĉon kontraŭ la decido de l' Akademio, tiam tiu ĉi decido estas nenigata.

*) Tiu ĉi Akademio estas efektive la centra komitato de la Ligo; sed ĉar en kelkaj landoj la apartenado al ia komitato aŭ Ligo estas ligita kun maloportunoj, tiel la Centra Komitato portas la nomon »Akademio« pro tiu sama kaŭzo, pro kiu la membroj de la Ligo havas la nomon »oferantoj«.

der Veröffentlichung des Akademiebeschlusses an gerechnet, zeigt, dass mehr als die Hälfte der Klubs ihre Stimmen gegen die Entscheidung der Akademie abgaben, dann ist der betreffende Beschluss vernichtet.

§ 17. Am Schlusse eines jeden Jahres fertigt die Akademie einen Bericht über die gesamte Arbeit des Bundes und den Stand der Bundeskasse für das verflossene Jahr und versendet denselben unentgeltlich an die einzelnen Klubs behufs Hinausgabe an die Mitglieder (Geber).

NB. I. Die alljährliche Rechnung muss auch den Nachweis enthalten, wieviel von jedem Mitgliede (Geber) besonders während der Dauer des Jahres zur Kasse einging, damit dasselbe ersehen kann, dass sein Beitrag Ablieferung gefunden hat.

NB. II. Wenn wegen der Verhältnisse des Landes, in welchem der Klub sich befindet, es nicht als angezeigt erscheint, demselben mehrere Exemplare des Berichts zu senden, so ist ihm wenigstens ein Exemplar in verschlossenem Couvert zu übermitteln, welches den einzelnen Klubmitgliedern (Gebern) zu unterbreiten ist.

§ 18. Die Wahl der ersten Akademie wird dann erfolgen, wenn die Zahl der Klubs des Bundes auf 25 gestiegen ist. Bis zur Wahl der ersten Akademie besteht das „Provisorische Verwaltungs-Comité aus den Herren

**Hugo Barbeck,**
**Chr. Schmidt** und
**Joseph Gagel** in Nürnberg.

So lange die erste Akademie nicht geschaffen ist, kann keine, auch nicht die kleinste Veränderung an der Sprache vorgenommen werden.

§ 19. Der Bund ist offiziell gegründet, und die vorstehenden Bundessatzungen empfangen gesetzliche Kraft von dem Tage an, an dem deren Veröffentlichung im „Esperantisto“ erfolgt ist. Wenn nachher irgend eine Aenderung in den Satzungen notwendig werden sollte, so kann diese nur nach der Entscheidung aller Klubs erfolgen, wenn es sich herausstellt, dass nicht weniger als 3/4 aller abgegebenen Stimmen mit der betreffenden Aenderung einverstanden sind.

§ 17. En la fino de ĉiu jaro la Akademio presas raporton pri la tuta laborado de la Ligo kaj pri la stato de la kaso de l' Ligo por la pasinta jaro kaj dissendas tiun ĉi raporton al ĉiuj kluboj por senpaga disdono al ĉiuj membroj (oferantoj).

Rimarko I. En la ĉiujara kalkula raporto devas esti ankaŭ montrita kiom en la daŭro de la tuta jaro en la kason envenis de ĉiu membro (oferanto) aparte, por ke ĉiu povu vidi kalkulon de la tuta mono, kiun li enportis.

Rimarko II. Se pro kondiĉoj de la lando, en kiu la klubo sin trovas, estas neoportune sendi al la klubo multajn ekzemplerojn de la raporto, al ĝi necese devas esti sendita en kovrita koverto almenaŭ unu ekzemplero por montri ĝin al ĉiuj membroj (oferantoj) de la klubo.

§ 18. La elektado de la unua Akademio estos farata tiam, kiam la nombro de la kluboj de l' Ligo atingos 25. Ĝis la elekto de la unua Akademio la „Provizora Administra Komitato“ konsistas el sinjoroj:

**Hugo Barbeck,**
**Chr. Schmidt** kaj
**Joseph Gagel** (ĉiuj en Nürnberg)

Sed antaŭ ol estos kreita la unua Akademio, en la lingvo Esperanto povas esti farata nenia eĉ la plej malgranda ŝanĝo.

§ 19. La Ligo estas oficiale fondita kaj la nuna Regularo de la Ligo*) ricevas leĝan forton de la tago, kiam ĝi estis publikigita en la gazeto „La Esperantisto“. Se poste estos necese fari iun ŝanĝon en la Regularo de la Ligo, tiu ĉi ŝanĝo povas esti farata nur post la voĉdonado de ĉiuj kluboj de l' Ligo, se montriĝos, ke ne malpli ol 3/4 de ĉiuj donitaj voĉoj konsentis je la proponita ŝanĝo.

*) La tekston de tiu ĉi Regularo en la lingvo Esperanta, germana, franca aŭ angla oni povas ricevi ĉe s-ro Hugo Barbeck en Nürnberg po 50 pfenigoj por 10 ekzempleroj (kun poŝta transsendo 70 pfenigoj).

---

## Novaĵoj.

En la lasta tempo sinjoro Chr. Schmidt havis en Nürnberg kelkajn publikajn paroladojn pri la lingvo Esperanto (en la klubo de urbanoj, en la klubo de inĝenieroj kaj arĥitektistoj). La paroladoj havis tre bonan sukceson kaj kaŭzis grandan interesiĝon de la flanko de la aŭskultantoj. La parolanto montris praktike la konstruon kaj la signifon de nia lingvo en jena maniero: al kelkaj aŭskultantoj li donis la malgrandan vortareton kaj poste li donis al ili leteron skribitan en Esperanto. Tute ne lerninte ankoraŭ la lingvon, ili per la helpo de la sola vortareto tute bone kaj libere tradukis la leteron sen ia malfacileco. Tiu ĉi praktika provo la plej multe konvinkis la aŭskultantojn kaj alportis al nia afero multajn amikojn.

La klubo Esperantista en Sofio, sub la prezidado de sinjoro M. S. Bogdanov, laboras kun tre laŭdinda energio. La klubo fondis sian gazeton („La Mondlingvisto“) kiu elirados en lingvo bulgara kaj parte en Esperanto 2 fojojn en la monato kaj servados por vastigi nian aferon en Bulgarujo. La Nr. 1 jam eliris. Ankaŭ la lernolibro de la lingvo Esperanto por Bulgaroj jam eliris. Kiu volas korespondi kun la klubo Sofia, devas adresi la leterojn: „al sinjoro M. S. Bogdanov, prezidanto de la klubo Esperantista en Sofio (Bulgarujo).“

Sinjoro José Rodriguez Huertas en Malaga eldonis la lernolibron de la lingvo Esperanto por Hispanoj.

La pastro katolika, sinjoro A. Dombroŭski en Ustjujna (Rusujo, gubernio Novgorod) preparas por la preso la tradukon de la vortareto Esperanta en la lingvon litovan (litthauisch).

La pastro rusa, sinjoro S. Bogoslavski en Akkerman (gub. Bessaraba) tradukis en Esperanton la komedion de Ostrovski „La malriĉa fianĉino“ kaj intencas baldaŭ eldoni ĝin prese.

Sinjoro Aĥmet Utjamiŝev en Aulie-Ata (Siberio, provinco Sir-Darja) skribis vastan artikolon pri nia lingvo en la tatara gazeto „Tolmalê“.

---

## Bibliografio.

Esperanto ossia la piu pratica delle lingue internazionali. Manuale compilato e corredato di copiosi esempi e di vokabolario per cura del Dr. Daniele Marignoni. Prezzo 60 Cent. Crema, Tipografio Carlo Cazzamalli.

Plena lernolibro por la mondlingvo de D-ro Esperanto. Parto unua plena gramatiko kaj parto dua vortaro internacia-Bulgara, eldonis Miloslav S. Bogdanov en Aitos (Bulgarujo). Sofia Apudpalaca presejo. 1890.

Gramática ejercicios y diccionario de la Lingvo Internacia del Doctor Esperanto por J. Rodríguez Huertas. 50 Centimos. Málaga, Imprenta de Manuel Cerbán Banos Delicias. 1890.

---


## Anoncoj.

**La presejo de W. Tümmel**
**en Nürnberg,**
de kiu tiu ĉi gazeto estas presata, rekomandas sin por ĉiuj presa laboroj.

**G. Zechmeyer en Nürnberg.**
Plej granda komerco de la poŝtsignoj.
Ĉiuj kasitaj poŝtsignoj estas aĉetataj kaj ŝanĝataj.
Alle gebrauchten Briefmarken werden gekauft und umgetauscht.

*Senpage instruas la lingvon Esperantan Vladimir Vladimirovic de Majnov en S. Peterburg.*


Für die Redaktion verantwortlich: Chr. Schmidt, Nürnberg. — Druck von W. Tümmel in Nürnberg.